

DECEMBRO 2010



MIRMEKOBO 11

Ni atentigas ke la URL de la retejo de Mirmekobo estas:

<http://web.me.com/donbroadribb1/>

*Sur la kovropaĝo: pentraĵo farita de la aŭstralia artisto Arthur Boothroyd, kiu festis sian centjaran naskiĝfeston 2010/10/1. La pentraĵo unue aperis en la libro *Sydney Builds an Opera House*, en 1973*

TABELO DE ENHAVO

sperto <i>Marioara</i> de Julia Sigmond	3
enigmoj de Sen Rodin	9
socio <i>Virino en la riparo de nacioj</i> de José de Paiva Netto.....	10
aventureto <i>Mia unua flugo per aviadilo</i> de Lenke Szasz.....	12
arto <i>Aŭstralia pentristo Arthur Boothroyd</i>	14
iom da amuzo kontribuis Ninoslav Mirić.....	24
(mal)seriozaĵo de Vojin Jovanovic	25
la historio de la skribarto (<i>parto 3</i>) de Donald Broadribb	26
literaturo <i>Malfacila fabelo</i> de Karen A. Simonian	29
solvo de la enigmoj.....	33



Ilustraĵo por infanlibro, de Arthur Boothroyd

sperto

Marioara

de Julia Sigmond (Italio)

La juna, bela kaj riĉa grafo devis edziĝi. Liaj gepatroj estis jam maljunaj. Ili havis sep infanojn, sed ses el ili mortis unu post la alia. Nur la sepa, la plej juna, kaj ververe la plej bela, restis en vivo. La maljuna grafoparo petegis lin, ke li edziĝu, ĉar ili dezirus vidi almenaŭ unu nepon antaŭmorte.

La juna grafo promesis al siaj amataj gemaljunuloj, ke li partoprenos la plej faman balon en Vieno kaj certe li trovos fraŭlinon, kiu ne nur bela estos, sed ankaŭ saĝa kaj naturon amanta. Krome ŝi devas ŝati legi, ĉar li intencis vivi kun ŝi en sia belega kasteleto, kie li havas grandegan bibliotekon, en la malproksima Transilvanio.

La maljunaj geedzoj senpacience atendis la jarfinon, kiam okazos la feliĉiga balo kie, espereble, la juna grafo trovos por si taŭgan junulinon.

En tiu decembro la vetero estis nekredeble milda. Nek pluvo, nek neĝo malhelpis la junulinojn belege sin vesti kaj per elegantaj kaleŝoj iri al la granda balo. Ĉiu junulino esperis, ke ŝi estos la bonŝanca, elektota de la juna grafo, ĉar jam en tuta Vieno, en ĉiuj salonoj de nobelaj familioj, nur pri tio oni klaĉis: la juna belulo ĉijare volas edziĝi.

Ne nur la junulinoj sin preparis al ĉi tiu balo, sed ankaŭ la gepatroj: ili volis aspekti senriproĉe, ke la ebla svatiĝanto vidu, ke ilia filino apartenas al taŭga familio.

La patrinoj surmetis ĉiujn siajn juvelojn, kaj ne nur la junulinoj, sed ankaŭ ili aspektis kiel vitrino de juvelisto. La patroj traserĉis ĉiujn tirkestojn por trovi la medalojn kaj ordenojn ricevitajn dum la lastaj jardekoj disde la grandanima imperiestro, eĉ se ili ne vere meritis ilin. Kiu ne havis sufiĉajn medalojn, ne hontis surmeti malnovajn medalegojn heredigitajn de la patro aŭ de la avo.

La juna grafo alvenis inter la unuaj gastoj. Li volis vidi ĉiujn alvenontajn junulinojn. Nu, li havis kion spekti. Alvenis unu familio post la alia. La pordgardisto per laŭta voĉo anoncis iliajn nomon kaj rangon. La junulo post iom da tempo terurigiĝis vidante la tro juvelŝarĝitajn fraŭlinojn, kaj kaŝe sed

elkore priridis la tro ornamitajn gepatrojn. Li eĉ ne povintus imagi, ke fakte ĉiuj lin volas konkeri.

Inter la junulinoj li rimarkis ankaŭ kelkajn iomete velkintajn fraŭlinojn, kiuj certe ne la unuan fojon venas al tiu fama balo, sed vane: ĝis nun neniu emis edziĝi al ili.

Aperis ankaŭ multaj junuloj, inter ili kelkaj kavalirstaturaj oficiroj.
Eksonis la muziko.

Ĝuste tiumomente aperis junulino sen tro ornamitaj gepatroj. Ŝia akompananto estis blankhara, modeste vestita maljunulo.

Forte ekbatis la koro de la juna grafo, kiam li rimarkis, ke la junulino havas nur solan kolrington kun ruĝa koro el rubeno, ĉirkaŭ kiu trembrilis etaj diamantoj. Ŝi estis tute malsimila al ĉiuj ĝis nun alvenintaj junulinoj. Ĉe ilia iomete malfrua apero eksonis la muziko, tial li ne aŭdis la nomojn de la maljunulo kaj de la junulino. Li pridemandis apudstarantan viron, sed li ne konis ilin. Kion fari? Nu, li iris al la maljunulo, sin prezentis, poste petis permeson danci kun la fraŭlino.

Dum la tuta balo li dancis nur kun ŝi. Ĉiuj junulinoj envie rigardis al tiu nekonatino, kiu sukcesis konkeri la junan grafon.

.....

Kun la permeso de la maljunulo, la juna grafo iĝis ĉiutaga gasto de ilia loĝejo luita. Fakte ili loĝis en malproksima kasteleto, kie la avo kreskigis sian solan nepinon, post la katastrofa akcidento, kiam mortis ŝiaj gepatroj. La avo decidis alporti ŝin al la fama balo, ĉar la nepino iĝis dekok-jara. Li alproksimiĝis al okdek, kaj deziris edzinigi ŝin por sekurigi ŝian futuron.

La amo inter la du gejunuloj rapide progresis. La juna grafo estis certa, ke li estos feliĉega se ili geedziĝos, ĉar li sentis la sinceran, mildan amon de modesta kaj belega junulino.

Kiam la juna grafo hejmen iris kaj rakontis al la maljunaj gepatroj, ke li trovis la plej taŭgan bofilinon, ili naĝis en ĝojekstazo.

La maljunaj grafoj kun la feliĉa junulo vizitis kaj svatis la junulinon. La bonkora avo kun larmoj en la okuloj donis sian konsenton. La gejunuloj tuj decidis fianĉiĝi. La kontentaj maljunaj grafoj invitis ilin al sia kastelo, kion kaj la avo kaj la feliĉa fianĉino tre volonte akceptis.

Printempe okazis la belega edziĝofesto, post kio la juna paro tuj vojaĝis al la malproksima Transilvanio, por loĝi en tiu kasteleto situanta en la mezo de arbaro. Ĉirkaŭe troviĝis nur kelkaj dometoj, en kiuj loĝis ĉiuj zorgantoj pri la ĝardeno kaj la kasteleto, eĉ se ne konstante loĝata de la proprietuloj.

La juna paro alvenis per kaleŝo malfruvespere, do nenio vidiĝis. Sed matene, vekiginte je birdopepado, la juna edzino malfermis la grandan vitran pordegon kaj trapasante la sojlon ŝi troviĝis en belega teraso, apud kiu belis la florgardeno kun centoj da rozoj. Tiam ŝi ekkriis:

“Tiu ĉi estas la domo de la ĉielo!”

Kaj tiun nomon ricevis fakte la eta kolonio, kiu nur poste pligrandiĝis kaj iĝis eta vilaĝo. Eĉ nun ĝi nomiĝas tiel: “Domo-de-la-ĉielo”.

Sub la grundo de tiu arbaro troviĝis resaniga fonto. En la kasteleto mem jam estis instalita interna bazeno. Post iom da tempo malkaŝiĝis la bonefika kuraca akvo kaj multaj riĉuloj konstruis vilaojn, kie iliaj familioj somerumis. Iu lertulo konstruis hotelon, kie same troviĝis bazenoj, kaj interne kaj ekstere.

Oni konstruis eĉ etan kapelon por la juna grafino kaj ĉiu dimanĉe venis pastro de la najbara urbeto por celebri la meson.

Dum la unua somero post la geedziĝo vizitis ilin la tri feliĉaj maljunuloj kaj kontente ili konstatis, ke la gejunuloj feliĉege kunvivas.

La sekvan jaron mortis la avo kaj post du jaroj ankaŭ la gepatroj de la juna edzo. Tiel ili ne povis ekscii kaj tristiĝi, ke neniam naskiĝis genepoj.

La feliĉaj gejunuloj longtempe vivis, ĝuante la belegan naturon kaj multe legante la librojn de la granda biblioteko. Ĉiuj amis kaj estimis ilin, kaj post ilia morto ĉiuj priploris ilin, ĉar ili estis bonaj, helpemaj homoj.

Ilin ambaŭ oni entombigis en la ĝardenon de la kapelo.

Ĉirkaŭ 100 jaroj pasis post ilia morto, kiam mi vizitis la unuan fojon tiun lokon

kun la bela nomo: “Domo-de-la-ĉielo”.

Mia kuracisto proponis al mi, kontraŭ la reŭmatismo, ke mi provu tiun kuracbanlokon. Laŭ multaj malsanuloj tiu akvo mirakle efikas. Multaj iras tien uzante lambastonon kaj revenas hejmen jam sen ĝi. Oni eĉ faris ekspozicion per tiuj forĵetitaj lambastonoj! La kuracisto diris, ke minimume tri semajnojn mi restu, ĉar du ne sufiĉas. Mi obeis al li kaj sep sinsekvajn jarojn mi tien iradis kaj uzis diversajn kuracmetodojn, sed precipe ĉiutage mi naĝis en la bonega interna bazeno. Kaj tiu sejjara kuracado ankaŭ min resaniĝis!

Trifoje mi havis la bonŝancon loĝi sola en ĉambro. Tio estis por mi vere paradizo. Krom la kuracado mi nur legis, ripozis, alportinte etan radion mi aŭskultis muzikon kaj multe-multe mi promenis.

Fojon mi iris kun unu el miaj plej bonaj amikinoj, Eva, kaj ni ambaŭ fartis bonege, ĉar finfine ni havis sufiĉan tempon por pridiskuti kaj rakonti nian tutan vivon. En Domo-de-la-ĉielo ni eĉ pli bone interamikiĝis.

Alian fojon mi estis sola kaj unu mia najbarino same loĝis sola. Post du tagoj tamen ŝi foriris. La postan jaron ŝi telefonis al mi: trafis ŝin tragedio, oni devas ŝin operacii en la kancerkliniko de mia urbo, ŝi petis mian helpon. Ŝi loĝis ĉe mi antaŭ kaj post la operacio kaj kiam ŝi resaniĝis ni kune vojaĝis kaj kunloĝis en tiu sama hotelo, kie ni konatiĝis.

Tamen el la sep restadoj restis plej neforgesebla tiu, kiam mia samĉambranino estis Marioara, mezaĝa kampara virino.

Krom la kuracado ŝi nur du aferojn faris. Preskaŭ konstante ŝi trikis ŝtrumpojn por siaj genepoj, escepte de dimanĉe, kaj ege multe ŝi preĝis. Ĝuste dum tiu periodo ŝi faris la plej severan kaj strangan faston, kiun mi ĝis tiam aŭdis. Ŝi klarigis al mi, ke tiu fasto havas miraklan efikon. Ĝi daŭras sep semajnojn. Dum la unua semajno oni ne manĝas nek trinkas vendrede; la duan, jaŭde kaj vendrede; la trian, merkrede kaj vendrede, la kvaran, marde kaj vendrede; la kvinan lunde kaj vendrede; la sesan, dimanĉe kaj vendrede; la sepan, sabate kaj vendrede!

Kiam mi alvenis al la hotelo, ŝi jam de kelkaj tagoj loĝis tie kaj estis en la kvina semajno de fastado. Tiel evidentis la tuta kozo, ĉar tagon ŝi ne venis al la manĝejo kun mi. Kiam mi interesiĝis pri la kialo, ŝi rakontis al mi sian fasto-

programon. Ŝi donis al mi la tiutagan bileton, ke mi manĝu ankaŭ ŝian porcion. Tion mi ne povis fari, tamen mi prenis kaj donis ĝin al iu almozulo.

Havante dekojn da korespondamikoj, mi jam antaŭe sciigis ilin kiam mi estos en la banloko. Tiel okazis, ke jam la duan tagon mi ricevis leterojn. Dum mi skribis la respondojn, mi demandis al Marioara: ĉu vi ne sendas bildkarton al via familio?

Neniam mi forgesos ŝian tristan rigardon, ŝiajn larmoplenajn okulojn, kaj ankoraŭ nun mi memoras ŝian tremantan voĉon, kiam ŝi konfesis al mi:

“Mi ne scias skribi.”

Mi eksaltis de mia lito, ĉirkaŭbrakis kaj provis konsoli ŝin.

“Ĉu vi scias la ekzaktan adreson, kie loĝas via filino?”

“Jes, mi scias. Ŝi estas la edzino de la vilaĝestro! Ĉar mia filino finis sep klasojn. Kaj ankaŭ miaj du genepoj lernas en la proksima urbo. Mia nepo jam estas studento kaj li iĝos doktoro!” — fieris la kompatinda virino.

“Marioara! Aŭskultu! Ni skribu al ili leteron. Vi diktos kaj mi skribos. Poste mi sendos per poŝto. Certe ili respondos al vi!”

Kaj tiel okazis, ke Marioara kun mia helpo skribis la unuan leteron de sia vivo. Eĉ ĉefdirektoro ne povintus dikti al sia sekretariino pli precize kaj korekte ol Marioara diktis al mi! Unue ŝi priskribis la situacion, laŭdis min (tion mi devis elteni, ĉar profunde mi sentis ŝian dankemon!), kaj rakontis pri ĉio. Ĉe la fino ŝi ne forgesis peti, ke ili bonvolu respondi al la letero.

Mi mem nur unu frazon aldonis: NEPRE RESPONDU KAJ RAPIDE, KE ŜI RICEVU VIAN LETERON!

Mi rapidis al la poŝtoficejo, ke la leteron oni tuj forsendu. La sekvan tagon, kiam mi alportis miajn alvenintajn leterojn, Marioara scivoleme demandis min: “Ĉu ne alvenis la respondo?”

Mi devis klarigi, ke ŝia letero nun vojaĝas per trajno. Eble ili ricevos ĝin morgaŭ. Se ili tuj respondos, post aliaj du tagoj espereble alvenos la respondletero.

Tagon mi rimarkis, ke ŝi ne uzas la lifton kiam ŝi venas sola al la 3-a etaĝo. Tiu surgrimpado laŭ la ŝtuparo daŭris kvaronhoron, pro ŝiaj dolorantaj piedoj. La

sekvan tagon mi faris signon apud la butonoj de la tria kaj de la ter-etaĝo, kaj mi instruis al ŝi, kiel oni devas uzi ilin. Ekde tiam, se ni iris kune mi lasis ŝin puŝi la butonojn. Ŝia sento similis al infana ĝojo pro nova ludilo.

Ŝi ne plu demandis, nur per gapantaj okuloj rigardis al mi ĉiutage, ĝis fine, kune kun miaj leteroj mi alportis al ŝi la respondleteron. Interplektante siajn manojn kvazaŭ preĝante, ŝi aŭskultis kion skribis ŝia filino. Poste ŝi plurfoje kisis la leteron, la koverton, aparte la tri poŝtmarkojn kaj ŝi petis, ke mi legu ĝin ankoraŭfoje. Ŝia dankemo estis tiel granda, ke ŝi eĉ ne povis bone esprimiĝi.

Mi jam ne memoras kiomfoje mi legis la leteron, sed fine ŝi jam parkeris ĝian enhavon. Ŝi prenis la leteron en sian manon kaj duonvoĉe — ke ŝi ne ĝenu min dum mi skribis — ŝi recitis por si mem, ne povante saturiĝi de ĝuo.

Tiel “Domo-de-la-ĉielo” alportis al Marioara la plej grandan kaj unikan ĝojon: tiu letero restis la *unua kaj sola* kiun ŝi ricevis en sia tuta vivo!

Interesa malnova komento

“[K]iam infanoj dekomence internigos laŭleĝemon en sin ... ili reeltrovos,” mi diris, “ĉiujn laŭŝajne malgravajn kutimojn kiujn la antaŭuloj abolis.”

“Kiujn?”

“Ĉi tiujn: Ke junuloj estu dece silentaj apud pliaĝuloj, kaj sidigu ilin kaj stariĝu por ili, kaj prizorgu siajn gepatrojn, kaj prizorgu sian stilon de hartondiĝo kaj de vestado kaj de ŝuoj, kaj la tutan mienon de la korpo, kaj ĉion alian tian.”

“Prave.”

“Mi opinias ke estus stulte fari leĝojn pri tio, ĉar oni nek plenumus nek konservus tiajn leĝojn, negrave ĉu vorte, ĉu skribe faritajn.”

“Evidente.”

Platono
La Respubliko
ĉ. 380 a.k.e.

enigmoj
de Sen Rodin (Italio)

N° 1

“En tiu ĉi frazo troviĝas literoj ‘i’”.

Tasko: sur la punktetoj skribu perlitere la ekzaktan nombron de la literoj “i” troviĝantaj en la frazo.

N°2

Tri belaj knabinoj petis ovojn de afabla ĉina kuiristo. Li diris al ili:
«Karulinoj, mi donos al vi ĉiujn ovojn, kiujn mi havas ĉi-momente.»

Dirite-farite:

Al la unua knabino li donis duonon de ĉiuj ovoj, kaj duonan ovon.

Al la dua li same donis la duonon de la restantaj ovoj, kaj duonan ovon.

Ankaŭ al la tria li donis duonon de la restaĵo, kaj duonan ovon.

Tiam li restis entute sen ovoj. La knabinoj elkore dankis kaj adiaŭis.

N.B.: La afabla ĉina kuiristo ne devis rompi eĉ unu ovon!

Demando: Kiomaj estis entute la ovoj?

Respondoj sur paĝo 33

Virino en la riparo de nacioj

de José de Paiva Netto (Brazilo)

La rolo de virino estas esenca por la postvivado de popoloj. Patrino, edzino, fratino, amikino, laboristino, familiestrino, gvidantino, ŝi estas nemalhavebla konsilanto.

Temas pri riparo, ĉar kiel la mondo troviĝas sub preskaŭbrulado pro la tutmonda varmiĝo, pli bone estas, ke la geuloj interfratiĝu, kunigu siajn fortojn kaj urĝe faru la riparon, ĉar male ni ĉiuj eble fine kuirigo en grandega kaserolo: la planedo, kie ni vivas.

Post tiu rimarkigo, mi petas permeson por fari justan omaĝon al la virinoj de ĉiuj tavoloj de la socio, al tiuj, kiuj estas la bazo de nacioj, kiam integritaj je Dio kaj/aŭ je plej altaj sentoj, kiuj honoras la homan rason, kaj por tio mi prezentas al vi tekston, kiun mi sendis kaj kiun oni tradukis ĉe UN al ties ses oficialaj lingvoj, okaze de la “51-a Sesio pri Statuso de Virino”, okazinta je la 26-a de Februaro ĝis la 9-a de Marto, ĉe la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj, en Novjorko, Usono.

“Pano kaj rozoj”

La batalado por emancipiĝo de virinoj estas malnova. Jam en la klasikaj tempoj de Grekio, tiu libereciga spirito iamaniere serĉadis sian vojon ĉe la klopodoj kaj malfacilaĵoj de “Lizistrata”, kiu faris seksumstrikon, kun partopreno de virinoj en Ateno kaj Sparto, por haltigi la Militon en Peloponezo, laŭ la komedio de Aristofano.

En 1857, centoj da laboristinoj en fabrikoj de tolaĵoj kaj vestoj en Novjorko komencis fortan proteston kontraŭ malaltaj salajroj, laborperiodoj de pli ol 12 horoj kaj aĉaj laborkondiĉoj. En 1908, pli ol 14 mil el tiaj laboristinoj revenis surstraten en Novjorko. Sub la slogano “panon kaj rozojn” — nome “pano simbolis ekonomian stabilecon kaj rozoj ian pli bonkvalitan vivon” — ili pledis por egalaj rajtoj kiel tiuj de laboristinoj de la 50-aj jaroj en la XIX-a jarcento. Proksimume 130 el ili mortis okaze de mistera dombrulo. Sed la batalado ne limiĝis al tio. Post tri jaroj, ankaŭ en tiu urbo, okazis alia tragika fakto kaŭzita de inferaj kondiĉoj de malsekureco ĉe “Triangle Shirtwaist Company”. Je la 25-a de marto 1911, pli ol 140 geteksistoj, plej multe de juda kaj itala deveno, mortis bruligitaj (21 estis viroj). La faktoj estis registritaj en sia tuta drameco: senesperaj homoj, kiuj sin ĵetis de la brulantaj fenestroj. La manifestacio okazintaj en la metropolo listiĝas kiel unu el la plej gravaj ŝtupoj por virina emancipiĝo, same kiel la strebado de multaj aliaj, kiel la germana Clara Zetkin (1857-1933), unu el la plej famaj aktivulinoj favore al virinaj rajtoj, kiu en 1910,

okaze de la II-a Internacia Kongreso de Socialistaj Virinoj, proponis la starigon de Internacia Tago de Virinoj.

Ilia kuraĝa sinteno perfekte enkadriĝas en ĉi tiu frazo de la neforgesebla Helen Keller (1880-1968): “Vivo estas ia aŭdaca aventuro, aŭ ĝi estas nenio!”

Evidente, la fama sociaktivulino aludas al la aŭdaco, kiu impulsas la pionirojn rekonsideri jam ne taŭgajn kutimojn kaj konceptojn, kiuj bremsas la evoluadon de homoj kaj popoloj (ĉefe en la nemalhavebla kampo de spirita kono). Ŝi mem estas ia modelo por tiu premiso. Blinda, surda kaj muta, kaŭze de malsano aperinta kiam ŝi estis 18-monata, ŝi rompis barojn kaj fariĝis unu el la plej respektataj virinoj en la historio.

La Animo de la Homaro

La rolo de virinoj estas esenca por la postvivado de la popoloj. Patrino, edzino, fratino, amikino, laboristino, familiestrino, gvidantino, ŝi estas nemalhavebla konsilanto. Tial, socioj, kiuj deprimas ilin agas malbone kontraŭ si mem. Virino klera kaj saĝa faras la familian ligon forta kaj la komunumon granda, altmorala, respektata kaj unueca.

Ĉi tiuj niaj asertoj resonas en tiuj de Charles McIver (1860-1906): “Plej fortoŝpara, facila kaj trafa vojo por universala edukado estas edukado al virinoj, kiuj fariĝos patrinoj kaj instruistinoj de estontaj generacioj”.

Estas nepra vero, ke nenia viro faras ion vere valoran, se li iel ne kalkulas pri virina inspiro. Efektive, “se vi edukas unu viron, tiam vi edukas unu individuon; sed se vi edukos unu virinon, tiam vi edukos unu tutan familion”. Precize, McIver.

Estas oportuna ankaŭ la aserto de la saĝa Goethe (1749-1832): “Inda viro longe atingos, se lin gvidos bonaj vortoj de saĝa virino”.

La brazilajn kaj tutmondajn virinojn ni salutas, okaze de ĉi tiu speciala dato: 8-a de Marto. Ĉiu tago tamen estas tago de virinoj, kies modelo de kuraĝo troviĝas en la Evangelio de la Kristo, laŭ Johano, 19:25, kiu raportas la apogon de Lia ricevitan en la lasta horo: “Sed apud la kruco de Jesuo staris Lia patrino, kaj la fratino de Lia patrino, Maria, la edzino de Klopas, kaj Maria Magdalena.” Tiuj heroinoj, en plej akra momento de doloro, ne forlasis Lin, sed restis ĉe Lia flanko, kiel senegala signo de kuraĝo. Sendube, nenia homa ago povas progresi sen la helpo, ĉu privata, ĉu publika, de virinoj. La Historio estas plenplena de koncernaj konfirmoj.

[el paivanetto.com. Uzita laŭ permeso de la aŭtoro.]

aventureto

MIA UNUA FLUGO PER AVIADILO

de Lenke Szasz (Rumanio)

Mi tre ŝatas bicikladi. Mallongan distancon, kompreneble. Ja edzino, patrino ne rajtas lasi sola sian familion longan tempon. Kutime mi bicikladas nur ĝis la najbaraj vilaĝoj, vizitas miajn amikinojn tie loĝantajn. Mi konscias, ke mi estas strangulino, ja neniu alia kolemino bicikladas, sed oni jam al kutimiĝis al mia “alieco”, kaj akceptas min tia, kia mi estas. Ja mi damaĝas al neniu, ne estas klaĉema, nek malica virino.

Foje mi aĉetis balailon sur la vendoplaco, kaj iris kun ĝi hejmen. Ekvidis min kolego, kaj demandis ŝerceme: “Ĉu ekde nun per ĝi vi veturos?...” Mi ekridetis kaj respondis: “Jes, per ĝi mi flugos.” (Sorĉistinoj flugas per balailo, laŭ malnova superstiĉo). Tamen ne per balailo mi flugis, kiam antaŭ kelkaj jaroj amikino invitis min al Anglio. Estis la ebleco vojaĝi per buso aŭ per aviadilo. Troviĝis malplikosta aviadilo, ol la buso, do, mi decidis *flugi* al Londono. Mia bofilo helpis min aĉeti bileton per interreto monatojn antaŭ la flugo. Dum tiuj monatoj da atendado okazis terorisma atenco en la londona metroo, kaj okazis, ke aviadiloj de famaj flugkompanioj falegis. Mi ektimis. Vane oni diris, ke pli da trafikakcidentoj okazas surtere, ol en la aero, tio ne trankviligis min.

Alvenis la tago de mia vojaĝo. Mi ne volis montri antaŭ mia filino timon, sed mi sentis min kiel mortkondamnito, kiu nur esperetas, ke venos tamen la indulgo, kaj li restos viva.

Mi miris, kiel senĝene oni manĝas, trinkas, ridas en la aviadilo, senzorgaj pro la ebleco, ke ni ĉiuj povas morti en ĉiu minuto. Sed la flugo iris glate kaj mildiĝis mia angoro. Mi eĉ komencis ĝui la vidaĵon desupre, kamparojn, riverojn, urbojn, la nubojn tiel proksime.

Apud mi sidis junulino, kiu vojaĝis al Londono por labori tie, kiel “*Baby sitter*”. Ŝi, do, flue parolas angle, mi pensis. Ĉar mi konas nur kelkajn anglajn vortojn lernitajn el televidaj filmoj, mi petis ŝin helpi laŭbezone, kiam ni alvenos al la londona flughaveno. Ŝi afable promesis interpreti, se estos necese.

Ĉio estis en ordo, post duhora flugo nia aviadilo surteriĝis en londona flughaveno. Mi aliĝis al mia nova konatulino, kaj ekstaris en la vicon kun ŝi, kvankam mi vidis la surskribon, kie devas stari la civitanoj venintaj el ekster la Eŭropa Unio (tiutempa). Tamen mi restis apud mia helpontino. Sed kiam ni estis antaŭ la deĵoranta oficisto, kaj li ekvidis mian pasporton, li diris ion al mi angle kaj montris al la alia vico. Feliĉe mia angla amikino, antaŭvidinta malfacilaĵon pro mia lingvo-nescio, estis sendinta antaŭ mia vojaĝo sian



vizitkarton kun nomo, adreso, telefonnumero kaj dorsflanke skribita, ke mi estas ŝia gasto, kaj ne parolas angle, nur esperante, oni ŝin kontaktu, se ekestos problemo.

Mi transdonis al la oficisto la vizitkarton kun pardonpeta rideto, li legis la skribon. Mi atendis, ke lia mieno rigidiĝos, fariĝos malamika kaj li kolere demandos: “Kion vi serĉas en Anglio, se vi ne parolas angle?” Sed okazis male. La oficisto tralegis la skribon de mia amikino, kaj kun afabla rideto donis al mi iun plenigendan enketilon. Mi ekstaris flanken por vidi, kion mi povas fari per ĝi. Mi komprenis, ke temas pri nomo, naskiĝjaro, adreso, civitaneco, tiujn rubrikojn mi scipovis plenigi kaj subskribi la enketilon, nenion pli. Mi reiris al la oficisto, li rigardis mian “verkon”, kaj kapjesante diris ion kun afabla rideto, poste li mem kompletigis la ceterajn rubrikojn por mi. Jen la unua, bona impresio pri la angloj!

Ĉe la elirejo atendis min mia amikino, kaj de tiam mi estis „hejme”-en Esperantujo.

Pasis tri neforgeseblaj semajnoj, kiam ni libere babiladis pri ĉio kio venis en niajn cerbojn, kiel du gimnaziaj amikinoj en la komuna loĝejo.

La tagoj pasis rapide kaj jen mi denove estas en flughaveno akompanata de mia amikino.



arto

Aŭstralia pentristo Arthur Boothroyd

(1910—)

Kelkaj pentraĵoj



Ilustraĵo por la libro Sydney Builds an Opera House (eldonita 1973)



Ilustrajo por la libro Sydney Builds an Opera House (eldonita 1973)



1989: Arthur Boothroyd pentras la ĉi-suban bildon por Australian Women's Weekly



Kovrilbildo de la magazino Australian Women's Weekly Decembro 1989



Madono kun infano



*Kovrilbildo de la magazino Australian Women's Weekly
Decembro 1988*



“Cirkaŭbraku arbon” pentraĵo



Arthur Boothroyd pentranta en Anglio, 1940



Arthur Boothroyd, 2010



Dum sia 100jara naskiĝdatfesto



Facadoj de Sydney III

Pri Arthur Boothroyd

Naskita la 1an de oktobro 1910 en Ormskirk, Lancashire, Anglio

1923 transiris al Aŭstralio en aprilo

Studis en la kolegio Swinburne Teknologia Kolegio en Melburno, poste en 1927-1931 en la Reĝa Art-Societo kaj la Teknologia Kolegio de East Sydney

1937 en junio reiris al Anglio kaj tie restis. Dum la 2a Mond-Milito li servis kiel kavaleriano en Anglio

Li studis arton en la Lernejo de Arto kaj Desajno en Chelsea, Anglio

1958 edziĝis kun Emmeline Whiteways en la anglikana kirko Sankta Paŭlo, en Seaforth, NSW.

1966 apartiĝis de Emmeline Whiteways

En 1961, 1963, kaj 1969 li ricevis la aŭstralian ĵurnalisman premion Walkley pro siaj ilustraĵoj en la aŭstralia semajna magazino Women's Weekly.



Ilustraĵo por infanlibro, de Arthur Boothroyd

IOM DA AMUZO

kontribuis Ninoslav Mirić



Vidas Haso kiel Mujo kuregas sur strato, kaj decidas demandi lin:

“Mujo, kial vi kuregas?”

“Mi kuregas al funebra cermonio de mia ĉefo! Li ĉiam ĉagreniĝas kiam iu malfruas!”



“Doktoro, estas terure, mi aŭdas sonojn, sed neniun mi vidas!”

“Kiam tio okazas al vi?”

“Ĉiam kiam mi telefonas!”



Iras du robotoj tra strato. Mi aŭdas ke viaj gepatroj dispartiĝos!” diris unu el ili.

Afiso

Oni bezonas telepatiulon! Alvoku, vi scias kiun nombron!



“Mi volus tralegi iun streĉan krimromanon!” diras virino.

“Prenu ĉi tiun — vi ne scios ke la ĝardenisto estas la murdisto, ĝis la fino de l' libro” diras la bibliotekisto.



Ĉirkaŭiras fabrikon Tito kaj demandas laboriston: “Kiom da ŝtalaj ŝraŭboj oni produktas ĉiutage?”

“Kvin, kamarado Tito,” respondis la laboristo.

“Nur kvin? Mi farus almenaŭ tridek!”

“Jes, vi, kamarado Tito. Vi estas seruristo, kaj mi diplomita ekonomikisto.”

(mal) seriozaĵo

Malserioze pri seriozaj interparoladoj de Serbio kaj IMF (internacia monfonduso)

(Verkita de Vojin Jovanović, la serba raportanto de la gazeto *ALO*, tradukita de Jadranka Mirić)

IMF: “Malgrandigu la ŝtatan administracion, malgrandigu la nombron de ministerioj!”

REGNESTARO: “Ho, ve, tio ne eblas. Endas ke kuzino Milkica, la filino de la bofrato de la ŝoforo de ministro, fariĝu ĉefo de personaro...”

IMF: “Kiu ministro?”

REGNESTERO: “Ministro por batalo kontraŭ aknohavanta populacio de junuloj inter 14 kaj 16 jaraj.”

IMF: “Ĥĥ... Ja, vi eĉ ne havas tian ministrejon!”

REGNESTARO: “Nu, nuntempe ni ne havas, sed post nova elekto, eble.”

IMF: “Kion vi faros pri junuloj pli ol dek ses-jaraj?”

REGNESTARO: “Ni malfermos novan ministrejon por ili!”

IMF: “Sed vi jam havas 22 ministrojn! Tio estas 10 pli ol via bezono!”

REGNESTARO: “Nu, 10, malmulte. Ja nia popolo diras ‘Pro pli da io la kapo ne doloras.’”

IMF: “Ho, sinjoroj, ĉe vi io malordas. Ja, kiel tiu Milkica, kiun vi menciis, la filino de bofrato, kiu ajn ŝi estas, kiel ŝi gvidus la personaron, ĉu ŝi havas iun ajn lernejan edukon kvalifikon?”

REGNESTARO: “Ŝi ne havas, sed ni donos al ŝi loĝejon..”

IMF: “Kian loĝejon, do?”

REGNESTARO: “Ŝtatan, kompreneble. Je funkcio de kuzino de bofrato, kiu estas la ministra ŝoforo, ŝi jam kolektis pli ol sufiĉe da poentoj.”

IMF: “Kaj kio okazus se ŝi iĝus kuzino de iu el via elektodistribuantaro?”

REGNESTRARO: “Ja, oni donus al ŝi 40 loĝejojn! Plus elektrejon!”

IMF: “Ĉe vi vere io estas en malordo...Ni foriru...”

[Iomete redaktita por Mirmekobo.]

Komento de la redaktoro: Kiam burokratoj intertraktas.....


LA HISTORIO DE LA SKRIBARTO

(parto 3)

de Donald Broadribb

Majuskloj, minuskloj, kaj kursivoj

La antikvaj klasikaj lingvoj (greka, latina, sanskrita, araba, hebrea, kc.) konis nur simplajn majusklojn. Ili ankaŭ ne kutimis meti spacon inter vortoj, konis neniujn interpunkciajn signojn, nek distingis alineojn. Jen kelkaj specimenoj:



Latina

(Sur la kolumno de Trajanus, ĉ. 111K.E.)




Greka

(Greka parto de Roseta Ŝtono, 196 A.K.E.)




(Hebrea, ĉ. 840 A.K.E.)

La norma formo de la latinaj literoj postulis multan tempon por ordinara skribado, kaj pli simpla skriba formo komencis populariĝi:



Frua skriba formo de la latina lingvo, el ĉ. 50 A.K.

Ankaŭ tiu formo poste estis multe simpligita kaj eknormigis minusklajn latinajn literojn:



Frua teksto latine skribita ĉ. 770k.E., unu el la plej fruaj ekzemploj de latinaj minuskloj.


kaj el tio iom post iom evoluis nia moderna sistemo de minusklaj literoj. En diversaj lingvoj la uzado de majuskla kaj minusklaj literoj obeis diversajn regulojn, kaj ankoraŭ nun tiel estas. En multaj lingvoj, ekz. la rusa, minusklaj literoj havas la saman formon kiel majuskloj, sed estas dimensie malpli grandaj. Ekzemple:

Пушкин, как известно, больше всего любил сидеть на балконе в доме Вяземского. Вот сидит он там, наблюдает как московские обыватели по
(Teksto el Puŝkin)



C. 200 a.K.E. la greka lingvo komencis populariĝi ankaŭ en la Romia imperio, kaj oni komencis enkonduki ekstrajn signojn por helpi prononci la vokalojn.

Tiajn signojn, kaj minusklajn literformojn la grekoj en la klasika epoko ne uzis. Sed post la fruaj jarcentoj k.E. oni komencis, simile al la evoluo de la latina lingvo, el simpligitaj manskribaj formoj uzi minusklajn formojn:



(Manskribita minusklolitera teksto greka ĉ. 550 k.e.)

Komparu tion kun nuntempe presita klasika verko:

κατέβην χθές εις Πειραιᾶ μετὰ Γλαύκωνος τοῦ Ἀρίστωνος
προσευξόμενος τε τῇ θεῷ καὶ ἅμα τὴν ἑορτὴν βουλόμενος θεάσασθαι
τίνα τρόπον ποιήσουσιν ἅτε νῦν πρῶτον ἄγοντες. καλὴ μὲν οὖν μοι καὶ
ἡ τῶν ἐπιχωρίων πομπὴ ἔδοξεν εἶναι, οὐ μὲντοι ἦττον ἐφαίνετο πρέπειν
ἦν οἱ Θραῖκες ἔπεμπον.

Unua alineo de Respubliko de Platono, en moderna eldono

Onia unua, tuja penso estas: “Ho! Mi multe preferas la modernan presformon ...oni povas facile legi ĝin, la vortoj estas apartigitaj, la vokalsignoj indikas kiel prononci. Kial la antikvaj grekoj mem ne spontanee skribis tiel?”

La klera respondo estas: oni pagas altan mensan prezon por nia “facile legebla: skribo. Oni ne legas kion skribis Platono mem, sed nur kiel iu modernulo *supozas* ke Platono skribintis. Kiam oni studas per la moderna eldono, oni studas ies modernan konjekton pri precize kion celis esprimi Platono. Se vi, neverŝajne, studis la antikvan grekan lingvon, vi scius ke la teksto vere tekstis tiel:

ΚΑΤΕΒΕΧΘΕΣΕΙΣΠΕΡΑΙΑΜΕΤΑΓΛΑΥΚΟΝΟΣΤΟΘΑΡΙΣΤΟΝΟΣΠΡΟΣΕΘ
ΞΟΜΕΝΟΣΤΕΤΕΘΕΟΚΑΘΑΜΑΤΕΝΕΟΡΤΕΝΒΟΥΛΟΜΕΝΟΣΘΕΑΣΑΣΘΑ
ΙΤΙΝΑΤΡΟΠΟΝΠΟΙΕΣΟΘΣΙΣΑΤΕΝΘΝΠΡΟΤΟΝΑΓΟΝΤΕΣΚΑΛΕΜΕΝΟ
ΘΝΜΟΙΚΑΞΕΤΟΝΕΠΙΧΟΡΙΟΝΠΟΜΠΕΕΔΟΞΕΝΕΙΝΑΙΟΘΜΕΝΤΟΙΕΤΤ
ΟΝΕΦΑΙΝΕΤΟΠΡΕΠΕΙΝΕΝΟΙΘΡΑΚΕΣΕΠΕΜΠΟΝ

kaj iu modernulo, kiu neniam mem denaske parolas la antikvan grekan lingvon, decidis kiel kaj kie enmeti vortdividajn spacojn kaj supersignojn. Poste alia modernulo tradukis, surbaze de siaj modernaj konceptoj kaj kredoj, kion intencis diri al ni Platono. Kiom ni prave fidu tiujn modernajn prilaborintojn de la teksto?

MIMEMRESPONDASTREMAKMULTEĈARDEMULTAJJAROJMIMENSEM
ERGASMINENLAKONCEPTOMONDODEANTAŬĈ2500JAROJPORPLIĜU
STEKONITIUJNVERKINTOJNKAJMITROVISKIOMDUBINDAESTASLAM
ODERNAJINTERPRETOJDEILIAJPENSOJ

Nu, sufiĉe!

literaturo

MALFACILA FABELO

de Karen A. Simonian
Elarmenigis Yenovk Lazian

Tiu ĉi fabelo mia estas la plej malfacila, ĉar mi mem ne scias, kial encerbiĝis al mi la deziro priverki la Drakon kaj la bravan Junulon, kiu kontraŭbatalis ĝin.

Drakoj sidantaj sur akvofontoj kaj kontraŭ ili batalantaj bravaj Junuloj ne estas io nova, ĉu ne? Sed mi alian temon ne havas. Neniu fabelaro estus kompleta sen tiu rakonto.

Do la kranoj senakviĝis denove, lastaj gutoj de la duŝoj falis sur la homojn kiuj ĵus prisapis sin, la lavmaŝinoj time eksilentis, la Poplo kies nomon oni skribis majuskle, malfeliĉe suspiris, kompreninte ke baldaŭ, tre baldaŭ, ĝiaj verdverdaj folioj ekvelkos pro brulsekeco.

Kaj la hundo Zangi maltrankvile kuradis tien kaj reen en la elsekiĝinta bedo de la rivereto. Ĝi subite haltis, turnis sin al la fora monto kaj eldiris:

“Haf!”

Sendube, la Drako volvinte la voston denove eksidis sur la akvofonto. Kaj kiel vi scias el aliaj fabeloj, kontraŭ fordono de iom da akvo, ĝi postulos de la homoj belulinojn aŭ multekostajn donacojn ornamontajn ĝian luksan kastelon. La homoj kutime evitis pliakrigi malamikecon kun la drakoj. Humile kaj obeeme ili donadis ĉion postulatan, eĉ pli: ankaŭ nepostulatan. Ili opiniis, ke la drakoj, tuŝite de tia malavareco, finfine forlasos sian malbonan kutimon senigi ilin je akvo.

Foje okazis ankaŭ, ke iam kaj tiam aperadis iu brava junulo. Kaj tia junulo ne tolerinte la senhontecon de la drako kaj timemon de homoj, eliradis batali kontraŭ la Malbono per armiloj kaj ŝildo. Tiukaze oni diradis ke komenciĝis batalo je vivo kaj morto. Laŭ mia scio la bonaj junuloj preskaŭ ĉiam malvenkas, kaj la drakoj daŭre plimultigas rabakiron: multekostaĵojn kaj sveltajn belulinojn.

Kiam la hundo Zangi eldiris “Haf!”, la homoj komprenis, ke la nura rimedo saviĝi de la Drako estos donacatigi ĝin. Neniu alia helpus, ĉar bedaŭrinde sentimaj junuloj iĝis malpli kaj malpli troveblaj lastatempe. Pli precize, ili montradis sian kuraĝon aliokaze kaj alimaniere. Ventrapide stiradis belegajn veturilojn laŭlonge de veturvojoj. Aŭ eĉ tute kontraŭe: side antaŭ la televidiloj en senmova trankvileco.

Tiaj kuraĝesprimoj estis ege oportunaj, ĉar neniam ankoraŭ okazis ke dum la veturego aŭ multehora televidrigardado iu falis en la fajroplenan faŭkon de la Drako kaj estis muelita inter liaj akregaj dentoj. Sed malgraŭ ĉio, fojfoje aperadis iu Kuraĝa Junulo, kiun oni foje renkontas en la fabeloj. Do ĝuste tia aperis en ĉi tiu fabelo mia.

La Kuraĝulo de mia fabelo ekstaris, surmetis la armilojn kaj protektilaron kaj paŝis laŭlonge de la strato al la fora monto. La majusklanoma Poplo postsusuris ion al la Junulo. Eble bondeziris al li kuraĝon. Renkontinte min ĉe la stratangulo, la Juna Kuraĝulo diris:

“Saluton, frenezeta maljunulo... Vi nepre volas okazigi pere de mi tiun ĉi fabelon, ĉu ne?”

“Estu sanega, Kuraĝa Junulo”, respondis mi, “Oni elpensis la fabelon en malproksima Hindujo, sed mi decidis rakonti ĉion miabuŝe kaj miaplaĉe, por ke ĉiuj komprenu kiu kaj kia vi estas. Neniu ja scias, kie vi estis ĝis nun, kaj de kie vi ekaperis.”

“Se tiel ĉio estas, venu kun mi”, diris la Kuraĝa Junulo, kaj mi komprenis ke li volas kunvojaĝanton.

“Ni iru kune!”

“Mi havos atestanton, kiu prirakontos mian venkon al la mondo.”

Verdire, mi mem enpuŝis lin en tiun entreprenon, do estus malhoneste lasi lin sola. Kaj ĉar mi jam komencis la fabelon, vole-nevole ni devis pluiri por atingi la finon. Do ni envojiĝis al la kastelo sur krutaĵo staranta. La Kuraĝa Junulo lasis min sidi surŝtone antaŭ la pordego. Kaj li mem lerte surgrimpis la muregon, suprensaltis en la korton, de kie mi tuj aŭdis lian voĉon :

“Drakaĉo, kie vi estas? Eliru eksteren! Mi venis por batali!”

La Drako ne rifuzis. Granda estis lia kolero pro tio, ke anstataŭ donacoj kaj oferdonoj de belulinoj alvenis la Kuraĝa naivulo.

La batalo vere estis je vivo kaj morto. Sed ĝi ne longe daŭris. La suno jam kliniĝis por subiri, kiam la pordego grince malfermiĝis kaj mi vidis la Kuraĝulon, kiu viŝinte ŝviton desur la frunto, diris: “Varmegas ja”. La drako kuŝis malantaŭ li disjetante lastajn fajrerojn el la faŭkego.

“Frenezeta maljunulo, diris la Kuraĝulo, “iru sciigi la gehomojn ke mi venkobatis ia Drakon... Kaj mi iru trarigardi la kastelon... Indus ja vidi, kiel vivas la drakoj.”

“Ne estu tiel,” respondis mi. “Ripozu iomete, revenigu la spiron, kaj ni kune malsupreniros en la urbon kaj la gehomoj aŭdu de via buŝo pri via venko.”

Sed li ne konsentis, ĉar eble pensis jam ke ne mi, sed li mem estas

komencinta tiun ĉi novan historion.

“Se tiei vi deziras, ne forgesu malfermi la kranon de la ĉeftubo, kiu venigas la akvon al la urbanoj.”

La Junulo lasis sian armilaron en la antaŭĉambro kaj eniris por proprokule vidi, kiel vivas la drakoj.

Komence li mire konfuziĝis. Neniam vidis li tiom da riĉeco. Bildoj de novaj kaj antikvaj pentristoj dispendadis sur la muroj. Sur marmoraj podioj staradis vazoj kaj kruĉegoj ornamitaj per multekostaj ŝtonoj. La plankon kovris antikvaj tapiŝoj, surpaŝante kiujn oni sentis magian forton alfluantan de la pasinteco.

La Kuraĝulo trairis la sekvan halon, kie de la planko ĝis la plafono staradis sennombraj libroj. Kiom da jaroj atendis ili la Kuraĝulon, kiu estos liberiginta ilin de la kaptiteco de pezaj ŝrankegoj. En la posta halo li vidis sub vitraj ŝirmiloj dismetitajn sonaŭskultilojn, kiuj neniam aŭdigis ĉarman muzikon dormantan en iliaj ĉielarke briletantaj diskoj kaj brunaj sonbendoj. Kiel mi diris iom antaŭe, la Junulo komence mire konfuziĝis, poste ekadmiris ĉion, kaj fine... Fine en lia animo naskiĝis stranga sento — poseddeziro. Li retrovis la sinregon. Penis sufoki la tenton.

Sed por ke oni povu regi sin, por ke oni ne fordonu sin al la Poseddeziro, ne sufiĉas esti kuraĝa kaj venkinta la Drakon en la fabelo, kies aŭtoro ne estas oni mem. Tiucele, laŭ la opinio de la Frenezeta Maljunulo, oni devas koni la sekreton de tio, kiel esti Liberulo. La Kuraĝa Junulo, kiu laŭ ĉiuj reguloj de mia fabelo venkobatis la Drakon, bedaŭirinde ne sciis, kiom bonas esti libera kaj kiom bonas la nepovo de riĉaĵoj enkatenigi la homon... Kiom bonas ne altrudi al aliuloj leĝojn pri tio, kiom da akvo trinku la gehomoj kaj kiom da aero ili enspiru. Nenion el tio sciis mia Junulo, kaj ĝuste tial en la preskaŭlasta halo li ne plu povis kontraŭstari la Poseddeziron kaj ĉirkaŭis sin per la arĝenta zono kuŝinta sur nigra veluro. Poste li ĉirkaŭmetis sur la brakon ĉarman braceleton kaj poste... Poste li ne plu klopodis kontraŭstari la Poseddeziron, kaj ĉirkaŭirante la palacon, kaj eĉ forgesinte malfermi la ĉefkranon, denove eliris eksteren, kie li lasis min kaj sian armilaron.

Li volis diri ion al mi. Sed anstataŭ la vortoj el la buŝo disflugis fajreroj...

Kapopende mi kunprenis la armilaron de la Junulo kaj malrapide ekpaŝis al la elirpordego. Li denove volis diri ion, sed el lia buŝo dissaltis fajro kun fumo.

Oni ne devis malfrui. Mi ĵetis min eksteren kaj kuregis desur la krutaĵo urben.

La gehomoj amase starantaj ĉe la stratangulo atendis novaĵojn.

La hundo Zangi maltrankvile kuradis tien kaj reen en la daŭre senakva

riverbedo. Kaj la majuskle skribiĝanta Poplo ŝanceladis siajn branĉojn. Mi ĵetis la armilaron de la Kuraĝa Junulo en la stratopolvon, kaj miaj mallaŭtaj vortoj disfendis la regantan silentegon:

“Ankaŭ ĉi-foje la drako venkis nian Kuraĝan Junulon.”

La aŭtoro, Karen A. Simonian, naskiĝis en 1936, grava armena prozisto kaj liberec-konservativa politika aganto. Li famiĝis per siaj sciencfantastaj romanoj, la unuaaĵoj de tiu genro en la armena literaturo. Fakte la formo permesis al li diradi multon en la soveta tempo alimaniere nedireblan.

Poste li verkis kelkajn biografiajn romanojn pri gravaj personoj en la armena historio kaj kulturo. Paralele li oficis kiel revuedaktoro, eldonejstro kaj fine kiel ministro de la amaskomunikado.

Multfoje li elektiĝis deputito de la parlamento. Agis sendepende, ĉu dum la soveta regado, ĉu poste. La registaro de la ŝajnsendependiĝinta Armenujo timis lian kreskantan influon kaj klopodis ĉiel forbari lin de la politika agado.

Devigite forlasi Armenujon, li ekloĝis en Franclando. Li daŭre verkas beletron, same kiel artikolojn por la armenaj gazetoj tra la mondo. Li gvidas la movadon por reenkonduko de la klasika ortografio, kiun la komunistoj misreformis en 1922 tiel fortranĉinte la patrujoĝantojn disde la diaspora armenaro.

Kelkaj teatraĵoj de Karen Simonian estas daŭre ludataj en la francaj teatroj. La ĉisupra rakonto estas elektita de la aŭtoro mem por esti tradukota.



solvO

de la enigmoj sur paĝo 9

N° 1

(NE) SOLVO:

Oni ne povas skribi “kvin”, ĉar tiamaniere la literoj
“i” iĝus ses.

Oni ne povas skribi “ses”, ĉar tiamaniere la literoj
“i” restus kvin.

Do la tasko estas neplenumbla.

N° 2

SOLVO

La ovoj estis entute *sep*.

Al la unua knabino li donis la duonon de ili (tri ovoj kaj
duono) kaj duonan ovon (do entute 4 ovoj).

Al la dua li donis la duonon de la restantaj tri ovoj (unu
ovo kaj duono) kaj duonan ovon (do entute 2 ovoj).

Al la tria li donis la duonon de la restanta ovo, kaj
duonan ovon (do entute *unu ovo*).

Kaj li restis entute sen ovoj.

La Mirmekobo



Kiel besto, la Mirmekobo (*Myrmecobius fasciatus*) estas preskaŭ elmortinta en sia indiĝena teritorio. Sed en sia revua formo, ĝi estas internacie havebla senpage, kaj ni esperas ke vi enhejmigos ĝin, nutros ĝin per viaj legado kaj kontribuo de enhavo, kaj ĝuados ĝin.

Adreso por ĉiuj komunikadoj, por peti ekzempleron aŭ por peti abonon, kaj por sendi kontribuojn:

mirmekobo@mac.com

Abono al la revuo estas senpage. Ĉar neniu surpapere presitaj ekzempleroj ekzistas, neniu preskosto ekzistas. Se vi deziras mem per via komputila presilo presi ekzemplero(j)n, por vi mem aŭ por aliaj, tion vi rajtas fari laŭdezire kaj senpage.

La revueto Mirmekobo estas sendependa, kaj subtenas neniun ismon. Artikolojn povas kontribui iu ajn. Tre bonvenaj estas literaturaĵoj: noveloj, poemoj, prozaĵoj iaspecaj; esprimoj de vidpunkto; historiaĵoj; prezento de interesaj hobiaj; biografiaĵoj, aŭtobiografiaĵoj; legendoj, mitoj... Bildoj, ĉu fotoj, ĉu desegnaĵoj, ĉu klarigaj, tre bonvenos. Reklamojn, anonc(et)ojn, propagandon, lingvajn studojn aŭ kritikojn, pornaĵojn, Mirmekobo malakceptas. La redaktoro rajtas akcepti, modifi, aŭ malakcepti ian kontribuojn, kiun li opinias malkonforma al la karaktero kaj reputacio de la revueto. Korektojn evidente bezonajn li rajtas fari, konsultinte la verkinton.

© kopirajto apartenas al la verkinto de kontribuajo.

Represo de kontribuajo estas permesata, se permeson konfirmas ĝia verkinto. Malnovaj numeroj de *Mirmekobo* troviĝas ĉe www.gazetejo.org/mirmekobo kaj ankaŭ ĉe la retejo de la redakcio:

<http://web.me.com/donbroadribb1/>

Redaktoro: Donald Broadribb